# *Prezidento de Kubo ?eestas eventon pro la 50-a datreveno de la Fronto Polisario*



Havano, maj 11 (RHK) La unua sekretario de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Kubo (CC-PCC) kaj Prezidento de la Respubliko, Miguel Díaz-Canel ?eestas ?i-merkredon al la ceremonio por la 50-a datreveno de la fondo de la Fronto Polisario  en la Universala Salono de la Revoluciaj Armitaj Fortoj (FAR), en Havano.

Partoprenis anka? Roberto Morales Ojeda, membro de la Politika Buroo de la CC-PCC kaj sekretario de Organizo, kaj Jatri Aduh, membro de la Nacia Sekretariejo de la Fronto Polisario kaj speciala sendito de

la prezidento de Sahara Araba Demokratia Respubliko (SADR).

Anta?e, en sia tvitera konto, Díaz-Canel skribis: “Ni festas la 50-an Datrevenon de la kreo de la Fronto Polisario, kiu kunigis en unu solan identecon la aspirojn al sendependeco kaj suvereneco de la frata popolo Sarahaui. La eterna subteno kaj solidareco de Kubo al ?ia legitima kaj historia afero”.

Tiu ?i nacia liberiga movado, kreita en 1973, celas fini la okupadon de Maroko kaj atingi la definitivan liberigon de la teritorio.

Ekde sia fondo mem, la Fronto Polisario (Popola Fronto por la Liberigo de Saguia el-Hamra kaj Río de Oro), establis kontaktojn kun Kubo.

La ligoj kun la  kuba komunista partio, bazitaj sur respekto, reciproka politika konfido kaj paco, permesis la disvolvi?on de la kuba medicina kunlaboro sur sahara grundo ekde decembro 1977 kaj inter?an?oj en la kampo de edukado kun ?eesto de studentoj de tiu respubliko en la nacio.

Fonto: ACN

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/322313-prezidento-de-kubo-ceestas-eventon-pro-la-50-a-datreveno-de-la-fronto-polisario

**Radio Habana Cuba**